

Okdek jaroj de esperanta vivo
La Unua Libro
Claude Gacond, 169-a radioprelego, 1967.01.04 & 1967.01.07

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Enirante novan jaron ni esprimas al ĉiuj niaj geaŭdantoj niajn plej samideanajn salutojn. Kaj ni dankas pro la bondeziraj vortoj, kiuj atingis nian studion.

A.- La jaro 1967 signifas por ni, esperantistoj, ke nia lingvo eniras sian naŭan jardekon. Tiun eventon ni nepre devos reliefigi.

Cl.- Por festi la okdekjariĝon de nia lingvo ni dediĉos nian atenton al niaj historio kaj literaturo. Estante arkivisto de Svisa Esperanto-Societo mi havas en la manoj multajn interesajn dokumentojn, kiujn mi provos prezenti al vi.

A.- Ni komencu per la komenco. Jen en niaj manoj fotokopio de la unua verko pri nia lingvo. Estas broŝureto skribita en la rusa.

Cl.- Traduko de ĝia titolpaĝo :

A.- *Doktoro Esperanto. Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro. Por rusoj. Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia. Prezo 15 kopekoj. Varsovio. Tipo-Litografejo de Ch. Kelter, strato Novolipje numero 11. 1887.*

Cl.- Ni turnu tiun titolpaĝon kaj ekzamenu tiun kvardekpaĝan broŝuron. Jen du avertoj :

A.- *Permesita de la cenzuro. Varsovio, la 21-an de majo 1887.*

Cl.- Kaj :

A.- *Internacia lingvo, simile al ĉiu nacia, estas propraĵo socia, kaj la aŭtoro por ĉiam forcedas ĉiujn personajn rajtojn je ĝi.*

Cl.- Sekvas rusa teksto de kunupaĝa, kiu prezentas la Lingvon internacian. Ni revenos al tiu antaŭparolo, sed nun ni menciui, ke ĝi asertas, ke ne estas necese koni la lingvon por povi ĝin legi. Pro tio sekvas ses tekstoj en la lingvo internacia, tekstoj deĉifreblaj helpe de radikaro aldonita fine de la libreto. La tekstoj prezentitaj estas :

A.- La preĝo *Patro nia*, la komenco de la biblio, letero, tri poemoj : *Mia penso, el Heine kaj Ho mia kor'.*

Cl.- Tiu akcento metita je poezio estas unika. Mi jam trafolumis multajn broŝurojn, kiuj proponis novan lingvon internacian. Tre malofte en ili oni trovas poemojn, kaj neniam poezio reprezentas la duonon de la tekstoj prezentitaj. Se oni ekzamenas la dek unuajn jarojn de la historio de esperanto, tiam oni rimarkas, ke tiuj tri poemoj ludis ege gravan rolon. Ilin lernis parkere ĉiuj adeptoj de Zamenhof. Kaj tiu parkerado estis speco de lingva fundamento. Ŝanĝi la lingvon, tio estus signifinta samtempe nuligi tiujn literaturajn perlojn. Pro tio, kiam reformemuloj provokos voĉdonon pri trudita reformo, tiam la plimulto esprimos la deziron konservi la lingvon, kia ĝi naskiĝis. Nur etan gramatikan ŝanĝon efektivigis Zamenhof mem, laŭ konsilo de Edgar von Wahl, en la unua jaro. La korelativa serio *ian, tian, kian, ĉian, nenian* fariĝis *iam, tiam, kiam, ĉiam, neniam*, por eviti konfuzon kun la akuzativigo de la serio *ia, kia, ĉia, nenia*.

A.- La sola utopia parto de tiu unua libro estas ĉapitro, kiu petas rikolton de promesoj. Doktoro Esperanto esperis ricevi 10 milionojn da subskriboj.

Okdek jaroj de esperanta vivo
La Unua Libro
Claude Gacond, 169-a radioprelego, 1967.01.04 & 1967.01.07

Cl.- Li ne antaŭkalkulis la danĝeran flankon de tiu peto. Imagu la alvenon de dek milionoj da subskriboj kaj la tempon necesan al la nura kopiado de tiuj nomoj kaj adresoj en la anoncita adresaro. Neniam malriĉa okulisto estus povinta akurate plenumi tiun promeson.

A.- Ni scias, ke rapide Zamenhof rezignis pri tiu ideo. Cetere lia lingvo ne bezonis nombran anaron por povi funkcii. Pri tio li asertas en la antaŭparolo.

Cl.- Tion pruvos la disvolviĝo mem de la lingvo. Kaj la sespaĝa plena gramatiko nur povis esti la plej majstra demonstro pri la facileco de tiu lingvo-projekto.

A.- Ni povas pensi, ke tiu koncizo devis eĉ veki dubon pri la precizo de la proponita lingvo, kaj pro tio instigi prove lerni la lingvon.

Cl.- Tiu studo aŭtomate entuziasmigis multajn personojn. Dum jaroj estis necesaj por nur iomete kompreni, kiel funkcias gepatra lingvo, kelkaj minutoj estas necesaj por akiri ideon pri la gramatika konstruo de la Lingvo internacia.

A.- Zamenhof en siaj 16 gramatikaj reguloj donas al la legantoj panoraman vidon super la gramatika fenomeno mem. Tiuj dek ses reguloj estas la gramatiko mem.

Cl.- Tion oni ne tuj komprenis. Oni subjektive admiris la geniecon de tiu gramatika demonstro. Poste oni eĉ proponis reformojn, kiuj rompis tiun konformecon kun la gramatika fenomeno mem. Tion bone sentis la esperantistoj. Pro tio ilia rifuzo al ĉia reformo.

A.- La ido-skismo senbalastigos la esperantistaron je tiuj reformemuloj, kiuj iros semi siajn kverelojn en la reformitan esperanton, tio estas en la nova projekto Ido de Louis Couturat kaj Louis de Beaufront.

Cl.- René de Saussure per sia demonstro pri la esperanta vortfarado, alportis regulojn, kiuj mankis en la unua verko. Kaj poste diversaj studoj de lingvistoj alportis diversajn konfirmojn pri la klarvido de Zamenhof. Nun oni povas objekte admiri la zamenhofan geniecon.

A.- Tiam oni komprenas la kaŭzon de la certeco de Zamenhof. Kiel vi aŭdos en venonta prelego, Zamenhof estis certa, ke nur lingvo de tipo aglutina, tio estas kungluema, kia esperanto, povos plenumi la rolon de lingvo internacia. Por Zamenhof la aglutina karaktero influas la gramatikon kaj la vortaron.

Cl.- Kontraŭe la aliaj kreintoj de projektoj de lingvoj internaciaj ĉefe interesiĝis al la vortoj. Ili konstruis unue vortarojn kaj provis dedukte malkovri gramatikajn regulojn. Ili konstruis lingvojn kiel eble plej similajn al la naciaj lingvoj. Por Zamenhof tio ne povas esti. Lingvo internacia havas alian funkcion, ol nacia lingvo.

A.- Estas tiu konvinko, kiu estis frukto de ne nur genia intuicio, sed ankaŭ de longa meditado, estas tiu konvinko, kiu instigis la doktoron Esperanto aserti, ke *por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia*.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-